# 5-a Azia Kongreso de Esperanto

Bengaluro (Barato) 11 – 15 februaro 2008

# DUA BULTENO



**Kongresa Temo**

*Esperanto en multlingva Azio*

5-a Azia Kongreso de Esperanto

# DUA BULTENO

5 - a Azia Kongreso de Esperanto

Bengaluro (Barato)

**LOKA KONGRESA KOMITATO:**

S-ino S. POORNA, s-ro M. C. SURESH, kaj s-ro Venkatesh REDDY
44, II CROSS, ANUGRAHA LAYOUT, BILEKAHALLI, OFF B. G. ROAD, BENGALURU 560076, KARNATAKA, INDIA
Kongresa kunordiganto:

D-ro P. V. RANGANAYAKULU
ranganayakulu@gmail.com
Tel: +91 94409 43542

D-ro Abdul SALAM, Prezidanto, FEB

D-ro A. Giridhar RAO, Ĝenerala Sekretario, FEB

Tel: +91 40 2331 6270 kaj +91 98494 29332
Retpaĝaro: www.geocities.com/bharato

# ENHAVO

Loka Kongresa Komitato (LKK)……………….. 3

Kelkaj faktoj pri Barato…………………………..4

Por eniri la landon…................................……… ..4

Utilaj informoj pri Barato kaj Bengaluro ............ .. 5

Barato, Karnatako kaj Bengaluro…….…………...7

La Kongresejo kaj la programo……………….. ..11

Loĝado…………………………….……............12

Duontagaj Ekskursoj……...............................…...15

Postkongresaj Ekskursoj………...………………16

Lingvogvidilo………………..………………… 21

*Kondiĉoj pri mendoj kaj malmendoj sur la mendilo*

## KELKAJ FAKTOJ PRI BARATO

Barato: Suverena, socialisma, sekulara, demokratia respubliko.

Ĉefurbo: Nov-Delhio

Areo: 3.287.590 k.m.$^2$

Loĝantaro: 1070 milionoj

Loĝanteco: 325 homoj/ k.m.$^2$

Geografia lokiĝo: Latitudoj 8 ° 4' kaj 37 ° 6 ' nordo. Longitudoj 68° 7 ' kaj 97 ° 25' oriento

Longeco de Marbordo: 7600 k.m.

Lingvoj: 23 oficialaj lingvoj kaj centoj da malgrandaj lingvoj.

Nacia besto: La tigro *(Panthera tigris)*

Nacia birdo: La pavo

Nacia floro: La lotuso

Nacia arbo: La banjano.

Religioj: Hinduismo, Islamo, Ĝajnismo, Kristanismo, Siĥismo kaj Budhismo, kaj pluraj popolaj kaj indiĝenaj tradicioj.

## POR ENIRI LA LANDON

La civitanoj el Nepalo kaj Bhutano ne bezonas vizojn. La civitanoj el Maldivoj, Tajlando, Indonezio, Malajzio kaj Srilanko ricevas vizon en la flughaveno je la alveno. La vizitantoj el ceteraj landoj devas havi vizon en sia lando mem antaŭ ol flugi al Barato. La paperoj de la azia kongreso sufiĉus akiri la vizon. Eĉ se vi posedas baratan vizon, vi bezonos specialan permesilon eniri la nord-orientan regionon kaj Andaman-insulojn.

Vizitantoj al Barato ne necesas registri sin ĉe la polico aŭ iu alia oficejo se ili restos en Barato malpli ol 180 tagojn.
La vojaĝantoj rajtas kunporti unu botelon de alkoholaĵo kaj 200 cigaredojn.

## UTILAJ INFORMOJ PRI BARATO KAJ BENGALURO

Barato estas en sudorienta Azio. La Hinda oceano ĉirakŭas Baraton triflanke. La golfo de Bengalo oriente kaj Araba maro okcidente estas etendiĝoj de la Hinda oceano. Barato havas komunan limon kun Pakistano, Nepalo, Bangladeŝo, Mjanmaro, kaj Bhutano.
**Klimato**: La februara klimato en Bengaluro estas agrabla. La temperaturo varias inter 20ºC kaj 25ºC. Do portu normalan vestaron. Apenaŭ pluvas en Februaro. Noktaj temperaturoj povas malaltiĝi ĝis 15ºC.
**Transporto**: Enlanda vojaĝo en Barato estas ne facile sen sufiĉa kono pri ĝi. Oni devas antaŭrezervi la kuŝlokojn en la trajnoj sufiĉe antaŭe se oni planas longan vojaĝon. Por distancoj ĝis 800 k.m. oni povas elekti busojn. La trajnoj estus pli bone por longaj vojaĝoj. La flugoj, kompreneble, estas multekostaj sed tujaj. Sed oni marĉandu kun la privataj flugkompanioj, ĉar ili ofte havas apartajn prezojn por alilandanoj. La ŝtata fluglinio 'Indian' estas registara fluglinio. La barata fervojo estas la plej granda fervoja reto en Azio. Ĉirkaŭ 11.000 trajnoj kuras ĉiutage. Preskaŭ la tuta lando havas alireblecon al la fervojo escepte kelkaj regionoj montaraj en la nordo kaj nordoriento.

La ŝtatoj havas siajn transportsistemojn busajn. En Karnatako, la Karnataka gubernia ŝosea transport-sistemo (KSRTC) estas la plej granda en la gubernio kaj servas busojn al ĉiu angulo de la regiono.

**Trafiko**: Memoru ke Barato havas maldekstran trafikon. Estu zorgema kiam vi transiras la stratojn!

**Lingvo**: La gubernia lingvo en Karnatako estas la kannada. En Bengaluro ankaŭ funkcias la angla kaj la hindia. Tiu ĉi libreto portas kelkajn esprimojn en la kannada lingvo kun Esperantaj tradukoj.

**Loka tempo**: GMT + 5.30 horoj.

**Elektraj tensio kaj frekvenco**: 240V kaj 50 Hz. La elektraj konektiloj estas de la tipoj C, D kaj F.

**Telefonado**: Aldonu 91 kaj urbokodon (sen nulo) kiam vi telefonas al telefono en Barato. Prefiksu 00 kiam vi telefonas el Barato al aliaj landoj.

## Emblemo

5 - a Azia Kongreso
de Esperanto

La emblemo montras du elefantojn kun levitaj rostroj ambaŭflanke. Tio indikas bonvenigon al partoprenantoj de oriento kaj okcidento. Elefantoj abundas en Barato. La elefant-riĉa gubernio Karnatako havas pli ol 5000 elefantojn sovaĝajn en la densaj ĝangaloj!

## Barata Mono




La monunuo en Barato estas Rupio. La rupio estis unue enkondukita en Barato de la reĝo Ŝer Ŝah en la 15a jarcento. La mono de najbaraj landoj (Srilanko, Maldivoj, Pakistano kaj Nepalo) ankaŭ estas la rupio. Sed la valuto estas malsama. Jen la kurzo de barata rupio dum la periodo de preparado de la Dua Bulteno. Unu rupio enhavas cent pajsojn.

1 usona dolaro = 39 rupioj

1 eŭro = 54 rupioj

100 enoj = 33 rupioj

## BARATO, KARNATAKO KAJ BENGALURO

Provu eltrovi de baratano la nombron de la gubernioj en Barato. Estas malfacile! Oni ne povas certe diri al vi pri nombro de gubernioj ĉar antaŭnelonge Barato kreis kelkajn novajn guberniojn. La nuna nombro de la gubernioj estas 30. La gubernio en Barato havas sian regionan parlamenton, kiu prizorgas kelkajn kampojn ekz. sanon, policon, edukon ktp. La centra registaro en Delhio prizorgas aliajn ekz. internacian komercon, internaciajn rilatojn, aviadilojn, fervojojn, bankojn ktp. La gubernio de Majsoro formiĝis je la unua de Novembro 1956. La gubernio de Majsoro renomiĝis Karnataka je la unua de Novembro 1973.

Karnatako estas parto de tiel nomata 'Suda ebenaĵo', kie la homoj apartenintaj al paleolita epoko eĉ vivadis.

En la frua historia periodo, Karnatako estis parto de imperio Maŭrja. La imperio Maŭrja estas fama pro la Reĝo Aŝoka, kiu sinturniĝinte al Budhismo, starigis multajn ediktojn ŝtonajn tra la tuta lando de Afganujo ĝis la Karnatako. Sep el tiuj ediktoj estas hodiaŭ videblaj en Karnatako.

Post la Maŭrjoj, Karnatakon regis la Satavahanoj ekde 50 a.K. ĝis la 250 p.K. Dum tiu periodo, komerco floris. La romia imperio komercis kun tiu ĉi regiono. Multe da romiaj moneroj (arĝentaj kaj oraj) estis trovitaj en Karnatako.

*Monero de Romio trovita en Banavasi*



La Kadamboj estas posteuloj de la Satavahanoj. Ili sukcese baris la vojon por la regno Pallava de la oriento. Banavasi estis la ĉefurbo de Kadamboj ĝis la 6a jarcento p.K. La plej glora periodo en la historio de Karnatako estis la regno de Ĉalukja ekde la 6a jarcento p.K. por tri jarcentoj. Ilia ĉefurbo estis Badami, kiu ankoraŭ allogas milojn da turistoj kun sia vasta ruinaro. La reĝo Pulakeŝi de la imperio Badami akiris famon. Ilin sekvis Raŝtrakutoj. Ĝis la deka jarcento p.K. Raŝtrakutoj kreis la mirindajn pentraĵojn de Aĝanta kaj skulptaĵojn de Ellora, kiuj nun estas en la ŝtato de Maharaŝtro.

Kvankam la Raŝtrakutoj eklipsis la Ĉalukjan imperion provizore, la Ĉalukjoj refondis sian regnon en Kaljani, do ili nomiĝas Kaljani Ĉalukja. La arkitekturo komencis akiri sian propran stilon tiam. En la

suda Karnatako, la Hojsala regno, apud Halebid kaj Belur, kreis belegajn kaj mirindajn templojn. En Kaljani, la Katahuri reĝoj sekvis la Ĉalukjojn. La fama reĝo Billala estas konata nomo pro sia ĉefministro Basaveŝvara, kiu estas unu el grandaj sociaj reformistoj en Karnatako.
Religie, kvar kredsistemoj, Ŝaivismo, Vaiŝnavismo, Budhismo kaj Ĝajnismo, disvastiĝis en Karnatako. Ĝajnismo kaj Ŝaivismo postlasis mirindajn arkitekturaĵojn en Karnatako.

Eble la plej interesa kaj alloga parto de la historio de Karnatako estas la periodo de la 14a ĝis la 17a jarcentoj pro la Viĝajanagara imperio. Ambasadoroj el Eŭropo, Rusio kaj Arabio vizitis la Viĝajanagaran imperion. Hampi estis la ĉefubro, kiu nun allogas milojn da turistoj. Vasko da Gama vizitis Baraton dum tiu periodo -- vizito kiu ŝanĝis la historion de ne nur Barato sed la tuta mondo. La reĝoj de Viĝajanagaro postlasis grandegan influon je la ĉiutaga vivo en Karnatako. Kriŝnadeva Raja estas la plej grava kies regno antaŭenpuŝis literaturon en la kannada kaj la telugua. Post kiam la lasta reĝo de Viĝajanagaro falis pro la unuiĝinta atako flanke de diversaj islamaj regnoj de la nordo, la regiono spertis reĝimŝanĝon. La Vodajaroj estas la reĝoj de Majsora regno. Tiam Majsoro estis la ĉefurbo de Karnataka regiono. Hajdar Ali, brava soldato, poste konstruis fortan lokan ŝtaton ĉirkaŭ Majsoro. Lia filo Tippu Sultan estis la brila heredinto. Sed en la fino de 18a jarcento



Tippu estis mortigita de britaj soldatoj kaj finfine Karnatako venis sub la Britoj.

Bildo: *Tippu (sidas dekstre) parolas al sia patro Hajdar Ali. (muralo)*

# BENGALURO

En la jaro 1120 p.K., la Ĉola reĝo Vira Ballala regis la plej parton de suda Barato. Iun tagon li aventuris en la densan ĝangalon ĉasi sovaĝajn bestojn. Sed li perdis la vojon. Vagante en la ĝangalo, li renkontis maljunulinon. Ŝi kompatis la reĝon lacan kaj donis manĝon. La manĝo konsistis el boligitaj faboj. Por repagi ŝian afablecon, la reĝo konstruis urbeton tie kaj nomis ĝin Benda Kaluru, kiu signifas boligitajn fabojn. Poste en la jaro 1537, la loka estro, Kempe Gaŭda helpis pligrandigi la urbon laŭplane. Hodiaŭ, la centro de la urbo nomiĝas Kempe Gaŭda placo.

Bengaluro, la ĉefurbo de la ŝtato Karnatako, estas la plej rapide kreskanta urbego en Barato. Afabla klimato, amikema popolo kaj la kreskanta ekonomio de Bengaluro allogas popolojn kaj industriojn de ĉiu parto de la mondo. Jam antaŭ 50 jaroj, Nehru, la ĉefministro de Barato, nomis Bengaluron 'la urbo de estonteco'.

Bengaluro estas la ĝardenurbo de Barato kun siaj multaj ĝardenoj kaj bulvardoj. Lalbag – la ruĝa ĝardeno – estis fondita antaŭ 200 jaroj! Bengaluro altiras multajn emeritojn, kiuj ĝuas la verdajn lokojn de la urbo. Bengaluro ankaŭ estas konata kiel la "Silikona valo" pro furora softvarindustrio; kaj pro multiĝo de la trinkejoj, Bengaluro nun estas ankaŭ urbo de trinkejoj!

**La Kongresejo**

NIMHANS CONVENTION CENTRE

Hosur Road, Bengaluro



NIMHANS estas Nacia Instituto pri Mensa Sano kaj Neŭra Scienco, fondita en 1954. NIMHANS multe laboras en la kampo de neŭrologio kaj fiziologio de la cerbo. La kongresejo de NIMHANS estas loko por internaciaj eventoj tra la tuta jaro. Ĝi situas ĉ. 11 k.m.-ojn for de la bengalura flughaveno.

## LA PROGRAMO

11a de februaro 2008 (Lundo)

14.00 : Akcepto de la delegitoj en la Kongresejo

18.00: Interkona vespero kaj Bankedo

12a de februaro 2008 (Mardo)

10.00 – 12.00 Inaŭguro

13.00 – 14.00 Tagmanĝo

14.00 – 17.00 Fakkunsidoj

19.00 – 21.00 Vespermanĝo kaj distraĵoj

13a de februaro 2008 (Merkredo)

9.00 – 12.00 Fakkunsidoj

12.30 – 13.30 Tagmanĝo

14.00 – 18.00 Duontagaj ekskursoj

14a de februaro 2008 (Ĵaŭdo)

9.00 – 12.00 Fakkunsidoj

12.30 – 13.30 Tagmanĝo

14.00 – 17.00 Fakkunsidoj

19.00 – 21.00 Vespermanĝo kaj Internacia vespero

15a de februaro 2008 (Vendredo)

9.00 – 12.00 Fakkunsidoj

12.30 – 13.30 Tagmanĝo

14.00 Fermo.

16a de februaro 2008

Postkongresaj ekskursoj.

21a de februaro 2008

Adiaŭo

## LOĜADO EN BENGALURO

Malĝojiga novaĵo estas ke Bengaluro estas unu el kelkaj multekostaj urboj en Barato. Sed LKK esploris divers-specajn malkarajn loĝlokojn en la urbo. Estas amasloĝejoj por tiuj kiuj volas tranokti malmultkoste. La tarifo estas inter 5 kaj 10 eŭroj nokte sen la matenmanĝo. Estas mezklasaj hoteloj, proksime de la kongresejo, kiuj kostas ĉ. 25 eŭrojn por persono por tago. La mantenmanĝo estas inkluzivita.

Pli luksaj hoteloj kostas ekde 25 eŭroj ĝis 400 eŭroj por persono por nokto. Jen estas la listo de hoteloj, kiuj lokiĝas en proksima distanco (malpli ol 3 k.m.) de la kongresejo.

1. **Oberoi**, M.G.Road, Bengaluro. Kvinstela, verda etoso, centra lokiĝo. 160 ĉambroj. Bonega ĝardeno ĉirkaŭe. Unulita ĉambro: US$ 525, dulita: US$ 550. Kun matenmanĝo. Plus imposto 12%.



2. **The Chancery Pavilion**, Residency Road, Bengaluro, kvinstela, centra lokiĝo, 234 ĉambroj, luksa etoso. Unulita/dulita ĉambro: US$ 160. Kun matenmanĝo. Plus imposto 12%.



3. **President,** Diagonal Road, Jayanagar, Bengaluro. Unulita ĉambro: US$ 80, dulita US$ 95. Kun matenmanĝo. Plus imposto 12%.



4. **Hotel Nandini,** 4th Block, Jayanagar, Bengaluro. 26 ĉambroj. Unulita ĉambro (neklimatigita) US$ 40, Ddulita US$ 50. Klimatigita unulita US$ 45, klimatigita dulita US$ 55. Ĉiuj kun matenmanĝo. Granda librovendejo najbare! Plus imposto 12%.



5. **Hotel Empire,** 5th Block, Koramangala, Bengaluro. Dustela hotelo. Unulita, neklimatigita US$ 40, dulita, neklimatigita US$ 46. Klimatigita unulita US$ 45, dulita, klimatigita US$ 55. Ĉiuj kun matenmanĝo. Plus imposto 12%




6. **Hotel Nandhana,** 6th Block, Koramangala, Bengaluro. 48 ĉambroj. Kun matenmanĝo. Unulita US$ 90, dulita US$ 105. Plus imposto 12%.




Ankaŭ eblas tranokti en la amasloĝejo, kiu kostas minimume 5 eŭrojn nokte. Sen matenmanĝo.

Se vi planas tranokti en la amasloĝejo bonvolu mendi tion. La amasloĝejo ankaŭ estas en malpli ol 3 kilometra distanco de la kongresejo.


**Pri la urbo**: Bengaluro lokiĝas je alteco 950 metroj (3115 futoj), do, la klimato estas tutjare milda. La urbo famiĝas pro fabrikoj de flugmaŝinoj, horloĝoj, telefonoj, fervojradoj, eĉ spaccentro, kaj plej laste pro la vigla informteknologia industrio. La urbo kreskis ĉirkaŭ fortikaĵo konstruita en 1537. Bengaluro estas administra urbo de britoj ekde 1831 ĝis 1881. Poste ĝi estis redonita al la reĝo de Majsoro. La Universitato de Bengaluro estis fondita en 1964. Ankaŭ

samjare la Universitato de Agrikulturaj Sciencoj estis fondita. La fama kaj prestiĝa Barata Instituto de Scienco estis fondita en 1909.

## DUONTAGAJ EKSKURSOJ EN BENGALURO

Nove edziĝinta paro en Barato ŝatas elekti la regionon Karnatakon por pasigi la mielmonaton. Konata kiel la ĝardenurbo de Barato, Bengaluro allogas multajn turistojn. La loĝantaro de Bengaluro kreskis de 3 milionoj antaŭ 30 jaroj al 6 milionoj nun. Sed la urbo konservas sian belecon kaj verdecon. La kongresanoj, kiuj volas esplori la urbon aliĝu al la tuttagaj duontagaj ekskursoj. La ekskurso kovros gravajn lokojn en Bengaluro. Inter ili…

*Vidhan Soudha, la regiona asemblejo. Konstruita konstraŭstare al la brita regiona asemblejo.



*Attara Kacheri, la fama konstruaĵo de Brita imperio nun funkcias funkcias kiel la ŝtata alta juĝejo.



*Bengalura Palaco, konstruita dum la Brita regno por simili al la kastelo Windsor en Britio, nun servas al la kinofilmindustrion kaj por fari ekspoziciojn.



*Inter tiaj malnovegaj arboj nun kreskas tiaj ĉi konsturaĵoj en Bengaluro*



*Hejmo por pacbirdoj: kolombo. Konstruita en Lalbagh, la Ruĝa ĝardeno.



Ni ankaŭ vizitos la templon ISKCON (internacia socio por Kriŝno), rokbovon alte staranta kaj muzeo de pentraĵoj de Rorich, la fama rusa pentristo, kiu amis la Himalajon kaj Bengaluron.

*La kosto*: 5 eŭroj (de 13.30 ĝis 19.00, je la 12a, 13a kaj 14a februaro)

## POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ

La Azia Kongreso en Bengaluro organizas du postkongresajn itinerojn. Bonvolu noti ke ni ne havas antaŭkongresajn itinerojn. Unu postkongresa okazaĵo montras al la partoprenantoj la plej gravajn lokojn en la gubernio Karnatako. La dua itinero prenos vin al la foraj lokoj en la norda Barato. La unua itinero havos Esperanto -ĉiĉeronon sed ne la dua. La duan organizas la agentejo.

La unua bulteno de la Azia Kongreso anoncis du itinerojn en Karnatako mem. Sed post fina planado, la LKK decidis organizi nur unu postkongresan ekskurson en la sudo. Tiu ekskurso miksas ambaŭ itinerojn antaŭe anoncitajn. Do la itinero Karanatako enhavas jenajn vidindajn lokojn laŭ la maro kaj la lokojn for de la maro.

1. **Vasta Banjanarbo**: kelkjarcent aĝa, 40 k.m. de Bengaluro. La vasta mirinda arbo, kiu kovras preskaŭ du hektarojn. Matenmanĝo estos servata sub la banjanarbo.

2. **La birdejo Rangantittu**: sur la insuloj en la rivero Rangantittu ŝvebas miloj da birdoj inkluzive la vespertojn. En la rivero mem la krokodiloj krokodilas! Sed la programo tenos vin sekura inter la krokodiloj sube kaj birdoj supre.

3. **Srirangapattana**: iama ĉefurbo de suda Barato. Tippu Sultan, kiu amikiĝis al francoj kaj batalis kontraŭ la britoj en la 18a jarcento lasis sian interesan rakonton ĉi tie. La fortikaĵo flanke de la rivero Kaveri kun la tombejo de Tippu allogas milojn da turistoj ĉiujare. Tranokto en Majsoro.

4. **Majsoro**: la ĉefurbo de la gubernio Karnatako ĝis antaŭnelonge. Ĝuu ĉi tie la magian palacon reĝan, temporaban artgalerion, kaj aliajn gravajn lokojn. Kvieta kaj paca urbo.




5. **Mangaluro**: la okcidenta marborda urbo preter la okcidenta montaro. Belega marborda loko kaj konata havenurbo. Tranokto en Mangaluro.

6. **Karvar kaj Devbag-insuloj**: ni tranoktos kaj pasigos tutan tagon en pura, senhoma kaj belega marbordo apud Karvar. Ni ankaŭ vizitos insulon en la maro. La belega ĉirkaŭaĵo inspiris la faman poeton, Tagore. Tranokto en Karvar marbordo.



*devbagh*

7. **Hassan**: ĉi tie vizitu la belegajn kaj mirindajn templojn Halebid kaj Belur. Ĉi tiuj temploj estis konstruitaj antaŭ mil jaroj kaj ankoraŭ estas daŭre vizitataj de pilgrimoj kaj turistoj. La skulptarto sur la muroj de la temploj estas mirinda en la mondo. Tranokto en Hassan.



8. **Sravanbelagola**: allogos vin la giganta nuda skulptaĵo sur la monteto. La nuda ĝajna skulptaĵo estas pli ol miljarmalnova. Kvankam estas nuda, ĝi allogas centojn da pilgrimoj ĉiutage. La nudeco ne delogas ĉar tiuj partoj de la skulptaĵo aspektas infanecaj.

9. **Bengaluro**: Ni alvenos al Bengaluro vespere je la kvina tago. Tranoktos en Bengaluro. Sekvinta tage, je la 21a februaro, ni vizitos turisme gravajn lokojn en Bengaluro mem. Ni ankaŭ havos tempon por butikumi aŭ ripozi.

*La kosto de la 6-taga programo*: Eŭroj 400. Inkluzivas transporton en klimatigita aŭtomobilo, tranoktadon en bona hotelo, manĝojn, enirbiletojn*, k.a.




## La Norda Itinero

Taĝ-mahalo: la sonĝo el marmoro

La ekskurso al la norda Barato estas organizota tuj post la kongreso depende je la nombroj de aliĝoj. La grupo unue flugos rekte al Delhio, nacia ĉefurbo, kaj de tie al Taĝ-mahalo en la urbo Agra. La duan tagon ni vizitos vidindajn lokoj en Delhio mem. Delhio estas konata pro la Kutub-minar (la alta turo apud Delhio), Ĝantar Mantar (la astronomia observejo), Ruĝa fortikaĝo, Barata Pordego kaj aliaj. Se vi havas tempon kaj inklinon, vi ankaŭ povas viziti Raĝastanon, la dezerta regiono, kun grandaj fortikaĵoj ĉirkaŭitaj de bluaj lagoj kaj eĉ rajdi kamelon!

*Malnova fortikaĵo*




Valoras viziti Baraton nur por vidi la marmore konstruitan Taĝ-mahalon en Agra, la nordbarata urbo. Agra estas apud la ĉefurbo Delhio. Taĝ-mahalo, aŭ Mumtaĝmahalo estas palaco de Taĝ aŭ Mumtaz, la reĝino de Mogala imperiestro Ŝah Ĝahan en la 17a jarcento. Ŝah Ĝahan amegis sian edzinon profunde. Do, post ŝia morto li ordonis konstrui la maŭzoleon kiu staru ĉiam. Mumtaz

mortis en 1630 dum la bebnasko. Taĝ-mahalo estis konstruita inter 1631 p.K. kaj 1648 p.K., dum deksep jaroj. Ĝi nun ankaŭ enhavas la tombon de Ŝah Ĝahan.

Taĝ-mahalo estas duetaĝa oktangula strukturo sur la grandega ebenaĵo. Kvar altaj turoj ornamas la konstruaĵon en kvar anguloj. En la tuta strukturo oni sentas la perfektan simetrion. Historio diras ke Ustad Ahmed Lahori estis la arkitekto kaj Amanat Khan desegnis la kaligrafion sur ĝi. La tuta strukturo estas farita el la blanka malvarma marmoro kolektita en la minoj en Raĝastano. Post kiam la filo de Ŝah Ĝahan ekregis la imperion, Ŝah Ĝahan devis pasigi siajn finajn jarojn en la malliberejo trans la rivero Jamuna rigardante al Taĝ-mahalo tra la malgranda fenestro, ĝis sia morto!

*La kosto de la programo*: Eŭroj 600. Inkluzivas flugojn inter Delhio kaj Bengaluro kaj vizitojn al Taĝ-mahalo kaj Delhio mem. Sen flugbileto al kaj de, la prezo estas 400 eŭroj.

**Bonvolu Noti: La bileto eniri kelkajn lokojn (ekz. Taĝmahalo) kostas kelkoble pli por alilandaj turistoj. Oni mem pagu nur la diferencon.*



*Kutubminaro*

# LINGVOGVIDILO

La kannada estas la ĉefa lingvo en gubernio Karanatakao. En Bengaluro ankaŭ funkcias la angla kaj la hindia. Jen kelkaj esprimoj en la kannada.

| | |
|---|---|
| Mi | Nanu |
| Li | Avaru |
| Ŝi | Avaru |
| Vi | Neevu |
| Ĝi | Adu |
| Tiu | Adu |
| Ĉi tiu | Idu |
| Patrino | Thaayi/amma |
| Patro | Appa/thandhe |
| (Vi) Venu | Banni |
| Venis | Bandaru |
| Venos | Baaruthare |
| Bonvolu sidiĝi | Kulitukolli |
| Marŝu | Nadeeri |
| Manĝu | Thinni |
| Trinku | Kudiyiri |
| Iru | Hogi |
| Kuru | Odi |
| Mi iros | Nanu hoguthene |
| Li iras | Avaru hogutaare |
| Li manĝus pomon | Avaru sebu(apple)thinuthaare |
| Li manĝas pomon | Avaru sebu thinnuthidhare |
| Li manĝis pomon | Avaru sebu thindharu |
| Li iros | Avaru hoguthare |
| Li venos | Avaru baruthare |

| | |
|---|---|
| Kio estas via nomo? | Nimma hesaru yenu? |
| Kio? | Yenu? |
| Via | Nimma |
| Nomo | Hesaru |
| Mia nomo estas ..... | Nanna hesaru ….. |
| Kion vi faras? | Neevu yenu madutheera? |
| Kial vi venis? | Neevu yaake bandhiri? |
| Kiel vi venis? | Neevu hege bandhiri? |
| Ĉu vi dormis bone? | Neevu hege malagidiri? |
| Kiom for estas? | Yestu doora hoghabheku? |

